

# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



N° 198 OKTOBRO 1998

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sumo: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO

(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)

BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE  
POUR L'ESPERANTO

\*\*\* *Sankta PIO X-a, preĝu por ni* \*\*\*

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



## Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
Sainte-Odile - <i>Sankta Odilia</i>	6
Dans notre association - <i>En nia asocio</i>	12
Congrès UECI - <i>UECI Kongreso</i>	16
Calendrier - <i>Kalendaro</i>	17
A travers le monde - <i>Tra la mondo</i>	18
Abonnements - <i>Kotizabelo</i>	19
Pelerinage de Lourdes - <i>Pilgrimo al Lourdes</i>	

**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto  
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer  
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

### Motif de non distribution

- Adresse insuffisante  
 N'habite pas à l'adresse  
 Refusé  
 Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Estas pluma desegno de iu vitralo de la preĝejo de Eguisheim (68) pri Sankta-Odilia (660-720), patronino de Alzaco.

En 1995 aperis faldkartoj kun tiu bildo en esperanto. Desegnis tion, Jean-P Cancel, art-desegnisto kaj esperantisto de Colmar.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 10.a de decembro.

Venonta bulteno aperos fine de decembro 98.

Finpresado la 05/11/1998

## FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 198 Oktobro 1998

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Espéranto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE  
28, Rue C. St-Saëns  
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A.M CHANEY  
56, Rue Corvisart  
75013 PARIS

Kasisto:

S-ro G. VILLENEUVE  
14, Rue Clair de Lune  
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto:

P-ro L. BOURDON  
7, Av. Salomon  
59800 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU  
95, Rue Victor Hugo  
80440 BOVES

Redakcio:

Fam. BASSO-RESCIO  
9, Rue Paul Doumer  
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623,3022@Compuserve.com

## Le Mot du Président

Quand l'oeil voit son frère, il se réjouit, dit un proverbe togolais. L'oeil se réjouit quand il voit son frère, d'abord parce qu'il est heureux de voir, de ne pas être aveugle. Nous qui jouissons de la vue, nous n'avons pas toujours pleine conscience de la grâce qui nous est donnée de voir les choses et les hommes qui nous entourent, de jouir de l'harmonie et de la beauté des couleurs.

Mais nous ne devons pas nous contenter de nous réjouir de la contemplation du monde réel qui nous entoure. Nous sommes croyants et nous devons aussi nous réjouir de voir, à travers notre Foi, les réalités invisibles et les vérités qui donnent un sens à notre vie et mettent déjà notre âme dans l'espérance joyeuse de notre rencontre avec le Créateur.

L'oeil se réjouit de voir son frère parce qu'il porte son regard sur autrui. L'oeil en effet ne peut voir l'autre oeil de son propre visage; il regarde forcément l'oeil qui pétillie sur le visage d'une autre personne et il y trouve joie parce qu'il reconnaît en l'autre un frère tout autant aimé de Dieu que lui-même.

La joie en effet ne peut être le fruit de notre égoïsme ou de notre confort, aussi douillet soit-il; elle ne peut trouver sa source que dans notre relation à autrui et la considération que nous lui portons, car il est notre frère.

Tel est le secret de la joie des chrétiens.

## La Bileto de la prezidanto

Kiam la okulo vidas sian fraton, ĝi ĝojas, diras togolanda proverbo. La okulo ĝojas, kiam ĝi vidas sian fraton; unue ĉar ĝi estas feliĉa vidi, ne esti blinda. Kiu posedas vidkapablon, tiu ofte ne plene konscias pri la graco donita por vidi homojn kaj aĵojn. Tiuj ĉirkaŭigas nin, ni do ĝuas la harmonion kaj la belecon de la koloroj.

Sed ĝui la kontempon de la reala mondo, kiu ĉirkaŭigas nin, ne povas kontentigi nin. Ni estas kredantoj kaj ni devas ankaŭ ĝui la vidadon, per nia Fido, de la nevideblaj aĵoj. Tiuj veraĵoj ja donas senson al nia vivo kaj jam enmetas nian animon en la ĝoja espero de nia renkontiĝo kun la Kreanto.

La okulo ĝojas vidante sian fraton, ĉar ĝi rigardas aliulon. La okulo ja ne povas vidi la alian okulon de sia propra vizaĝo; ĝi devige rigardas la okulon, kiu fulmetas sur alies vizaĝo; ĝi trovas ĝojon en tio, ĉar ĝi rekonas en la aliulo fraton, tiel amata de Dio, kiel ĝi mem.

Ĝojo ja ne povas esti la frukto de nia egoismo aŭ de nia komforto, tiel ampleksa, kiel ĝi estas; ĝi povas trovi sian fonton nur en nia rilato kun la aliaj, en la estimo kiun ni alportas al ili, ĉar ili estas niaj fratoj.

Tia estas la sekreto de la ĝojo de la kristanoj.



## PREĜO

### PANO DE HUMILECO


Ho Jesuo, donu al mi, mi petas,  
la panon de humileco  
la panon de obeemo  
la panon de karitato  
la panon de forto por rompi mian volon kaj  
fandi ĝin en la via  
la panon de propra humiliĝo  
la panon de malligo el la kreaĵoj  
la panon de pacienco  
por elporti la zorgojn, kiuj suferigas mian koron.

Ho, Jesuo, Vi volas, ke mi estu krucumita, fiat

La panon de forto por bone suferi  
la panon por vidi Vin sola ĉiel kaj ĉiam.

Jesuo, Maria, la Kruco  
Mi ne volas aliajn amikojn, krom tiuj ĉi.

Fratino Marie Bernard Soubirous.





## SANKTA ODILIA (660-720)

*Ŝi estas la patronino de Alzaco kaj ĝi estas la plej bela monto de tiu regiono, de kie oni ekvidas vastan panoramon, urbojn. Ĉiutempe dum la jaro la pilgrimantoj ĝin vizitas. En ĝia paco rifuĝas la homa koro, turmentita de teraj zorgoj.*

Dum la tempo de l'reĝo Ĥilderiĥ la IIa de Francio oni faris el Alzaco duklandon; duko fariĝis la nobelo Attich, kies sidejo estis Oberehnheim. Estis la plej sopira deziro posedi heredanton, sed longtempe Dio ne plenumis lian petegon. Fine li donis al la gepatroj blindan filineton.

La patro tiom ekkoleris, ke li intencis mortigi la infanon. La duko diris al sia edzino: "Zorgu, ke la blinda infano estu mortigota de unu el miaj malamikoj aŭ ke ŝi estu forportata malproksimen de ni, por ke ni ŝin forgesu. Ĉar alimaniere mi neniam plu fariĝos ĝoja."

La patrino malĝojegis pri tio; fervore ŝi preĝis

al Dio pro helpo en ĉi tiu mizero. Dio igis ŝin pensi pri virino, kiu foje estis ŝia servistino. Ŝi venigis ŝin kaj rakontis al ŝi intencon de l'duko. La pia virino konsolis la patrinon dirante, ke Dio, kiu donis al la knabineto tiun nebonon, ŝin ankaŭ povas igi vidanta.

Ŝi kunportis la infanon kaj transdonis ŝin al sia fratino, kiu estis abatino en la monaĥinejo Palma en Burĝonjo..

Tiutempe Sankta Ekhardo, episkopo en Regensburg, havis strangan vizion; el ĉielo li aŭdis la ordonon, ke li vojaĝu trans Rejnjon al la monaĥinejo Palma, kie li renkontos blindnaskitan knabineton; ĉi tiun li baptu Odilia, kaj ŝi fariĝos vidanta!

La monaĥinoj edukis la infanon kun granda amo

kaj instruis al ŝi la Sanktan Skribon. Kaj la knabineto tre virte pliaĝiĝis kaj forpelis ĉiun fieron.

Kiam la episkopo tuŝis ŝiajn palpebrojn per la Sankta Oleo, Odilia ekvidis !!!



Reveninte en Bavario, episkopo Ekhardo per sendito sciigis al duko Attich la ĉielan ordonon, kiun li estis plenumita. Li petis lin, ke li akceptu denove la infanon, kiun li foje estis forpelinta. Duko Attich ne respondis.

Nun Odilia, kiu dume fariĝis tre bela kaj pia knabino, sciigis, ke ŝi havas fraton, Hugo, kiun la patro amas. Al ĉi tiu ŝi skribis leteron, petante lin pri la amo de sia patro, por ke ŝi povu ĝoje revidi lin.

Ricevinte tiun ĉi leteron, Hugo parolis al la patro: "Bona patro, mi petas, ke vi aŭskultu la peton de via filo". La duko respondis: "Se vi ion nedecan deziras, ne estas necese, ke mi vin aŭskultu."



Kaj la filo diris: "Estas deca peto, ho patro, ĉar mi nenion alian deziras ol ke via filino, mia fratino, kiu en mizero vivis longtempe kaj sen konsolo, akiru nun vian amon kaj ĝuu vian ĉeeston."

Sed la patro ordonis silenton. Hugo eksentis kompaton pri sia fratino kaj sekrete pretigis veturilon kun ĉiuj necesaj aĵoj kaj ĝin sendis al sia fratino.

Iun tagon, dum la duko sidis en sia kastelo Hohenburg kun sia filo kaj la kavaliraro,

alproksimiĝis ornamita veturilo. Kaj kiam la duko demandis, kiu venas, la junulo malkaŝe respondis, ke estas lia fratino Odilia.

Nun la duko ekkoleris, kriante: " Kiu estis tiel malsaĝa kaj eĉ krima, ke li ŝin venigis sen mia volo ! ? "

Sed Hugo respondis: " Estro - mi, via filo kaj servanto, tro profunde sentis la honton, ke ŝi devis vivi en tia malriĉeco, kaj mi kompatis ŝin. Pardonu al mi ! ". La duko perdis ĉiun prudenton: li levis la bastonon kaj batis la junulon. Kaj ĉi tiu tuj mortis .

La patro, vidante tion, ektimegis pro sia malbonfaro kaj akceptis la filinon en sia domo. Odilia fariĝis ankoraŭ pli pia kaj saĝa, kaj la famo de ŝia beleco kaj de l'riĉeco en la kortego de l'patro penetris en la tuta lando. Anoncis sin pro tio multaj nobeloj, por peti ŝian manon. La patro kaj la korteganoj insiste ŝin petis, ke ŝi elektu edzon, sed la pia

virgulino restis fidela al sia solena promeso, senedze ami kaj servi Dion ĝis la morto. La patro ekkoleris pri tiu neforigebla fidelo kaj perforte volis ŝin kunigi kun iu princido. Odilia sin savis per forkuro. Ŝi forkuris nevidite tra kastela pordeto en valon, kie ŝi formetis siajn riĉajn vestaĵojn kaj surmetis malriĉan, pilgriman kitelon ; kaj ŝi rapidis al Rejno. Ŝipisto en boato transigis ŝin al la alia bordo; ŝi serĉis rifuĝejon en la montaro.

Kiam Duko Attich rimarkis la forkuron de sia filino, li rajdante persekutis ŝin kune kun la kavaliroj - inter ili estis ankaŭ la fremdaj nobeloj. Per informistoj li baldaŭ eksciis la direkton de ŝia forkuro.

Dume Odilia marŝis en la montaro tra la densejoj sen scio de iu vojo, ĉiam fidante al Dio kaj al sia senkulpeco. Kaj iun tagon ŝi lacege falis teren por ripozi, kiam ŝi el malproksimeco ekaŭdis fortan klakadon de hufoj kaj bruadon de armiloj.

Rapide ŝi sin levis, supren kuris sur monton kaj serĉis rifuĝejon por sin kaŝi. Estis vane. Nun ŝi surgenuis kaj fervore preĝis al Dio pri kompato. Jam la patro alproksimiĝis por ŝin ekpreni, kiam Dio kompatis ŝin. La ŝtonega muro malfermiĝis, kaŝis en si la virgulinon kaj denove sin fermis antaŭ la rigardoj de l'persekutantoj .



Duko Attich estis kortuŝita kaj bedaŭris sian agon. Li laŭte vokis ŝin per nomo, promesante al ŝi la liberecon, por ke ŝi povu vivi laŭ sia deziro. Denove disiĝis la ŝtonego, kaj el ĝi pasis Odilia en la brilo de siaj senkulpeco kaj sankteco, tiel ke la rajdantoj mirante rigardis ŝin.

Depost ĉi tiu horo, la

ŝtonega kaverno restis malfermita. Klara fonto fluas el ĝi en la valon, kies akvo sanigas malsanajn okulojn. Sur la groto staras nun pilgrima kapelo je memoro de la sanktulino. Duko Attich donacis al sia filino la kastelon Hohenburg kaj monsumojn por fondi monaĥinejon, kies abatino ŝi fariĝis.

Nelonge post tio la Duko mortis, kaj la pia filino konstante preĝis kaj fastis, vidante, ke la patro suferas gravajn dolorojn en la purgatorio pro siaj gravaj pekoj. Ŝi volis lin liberigi el ĝi.

Odilia estis por ĉiuj monaĥinoj modelo de simpla kaj severa vivmaniero. Ŝia manĝaĵo estis hordea pano, ŝia lito felto de urso kaj ŝia kuseno malmola ŝtono. En la vasta lando la piulino estis konata; miloj da homoj pilgrimis sur la monton, por vidi ŝin kaj

preĝi kun ŝi. Multajn malsanulojn ŝi sanigis. Kaj ĉar la nombro de l'malsanuloj daŭre plimultiĝis, ŝi je duona alteco de l'monto, ne malproksime de St-Nabor, konstruigis hospitalon por malsanuloj kaj kripuloj. Ŝia patrino Beresvinda donis al ŝi la necesajn monsumojn. Odilia fondis duan monaĥinejon en proksimeco de la hospitalo, kiun ŝi nomis Niederhohenburg (malsupra Hohenburg); ŝi mem restis ĝis sia morto abatino de ambaŭ fondaĵoj. Kiam Odilia timeme prizorgis la konstruadon de la dua monaĥinejo, viro venis al ŝi, alportante tri branĉojn de tilio, por ke ŝi ilin plantu antaŭ la konstruaĵo je sia memoro. Odilia fariĝis tri fosojn, propramane plantis la unuan branĉon je l'nomo de l'Patro, la duan je l'nomo de l'Filo, la trian je l'nomo de l'Sankta Spirito. La tri branĉoj fariĝis grandegaj arboj. Nuntempe ankoraŭ

staras tri tilioj sur la sama loko. Ŝiaj mirakloj fariĝis konataj. Kiam ŝi iun fojon preĝis, la mastrina monaĥino alvenis kaj plendis, ke ŝi ne havas sufiĉe da vino, por ĝin disdoni al ĉiuj monaĥinoj; Odilia respondis: "Dio, kiu satigis kvin mil homojn per kvin panoj kaj per kvin fiŝoj, ankaŭ nin satigos per tiu malmulta kvanto da vino. Iru en preĝejon kaj preĝu." Kiam la mastrina monaĥino pretigis la manĝadon, ŝi trovis la barelon plena je vino. Dum la konstruado falis en abismon kvar bovoj kaj veturilo kun ŝtonoj. Per la preĝado de Odilia ili absolute ne estis vunditaj, tiel ke ili povis suprentiri la veturilon tuj poste, por ke la preĝejo estu finita. Kiam ŝi foje malsupreniris al Niedermunster, ŝi renkontis pilgrimulon kuŝantan apud ŝtono; li suferis je soifo. Ŝi ekkompatis pri li kaj per

sia bastono frapis al la ŝtonego. Tuj saltis el ĝi klara kaj freŝa fonto, per kiu la duone mortinta pilgrimulo povis sin revivigi. Sed iom post iom alvenis la tempo, en kiu Dio Sinjoro finis la vivon de sia servantino. Odilia antaŭsentis sian lastan vivhoron kaj paŝis transen en la kapelon Sta Johano. Ĉiujn monaĥinojn ŝi kolektis ĉirkaŭ si kaj ilin petis, ke ili ĉiam migru sur

la vojo al Dio. Dume la animo de la sanktulino flugis en la ĉielon. Bonodoro, kvazaŭ de mirho plenigis la kapelon, tiel ke la monaĥinoj ekvidis sian abatinon Odilia mortinta sur genuoj. Ili multege ĉagreniĝis kaj preĝis al Dio.

Tradukis Charlotte Pulvers en 1911 por Esperanta Biblioteko Internacia Nro 28. Bildoj el libro "la Vie de Sainte-Odile" 1994. Editions du Signe.

Ĉu vi jam mendis :

## "DIO PAROLAS AL SIAJ INFANOJ"

Eldonita de la Franca Katolika Esperanto Asocio ?  
Tiu eta Biblio (12x19 cm 96 paĝoj kun koloraj ilustraĵoj)  
por infanoj -kaj ankaŭ por plenkreskuloj estas havebla .  
PREZO kun sendokostoj : 40 Frankoj (FF)

Se vi ankoraŭ ne faris, mendu tuj ĉe:

S-ro Roger PONS  
3,Rue du 8 Mai 1945  
F-87510 NIEUL.

## EN NIA ASOCIO

### Novaj membroj :

- 08/ S-ro CHEVALIER D. (Yvelines)  
 09/ S-ino CHEVALIER (Yvelines)  
 10/ S-ino DEPECKER T. (Savoie)  
 11/ S-ino MARTIAL Y. (Manche)

**Bonvenon** al la genovuloj .

Donacis mono:

S-ro CORNUT kaj S-to RUMPAOT

Bonfaranto 1998 :

- 3/ S-ino CHEVERRY (Maine et Loire)  
 4/ Anonimulo (Essonne)

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

### PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO EN REZE

La ĝenerala kunveno okazis en la posttagmezo de la jaudo la 30-an de julio 1998, prezidinta de S-ro Bessièrè.

S-ro Despiney salutis la kongreson per letero; F-to Marmou, malsana, senkulpiĝis.

La agadraporton aprobis 27 personoj, 3 voĉdonis kontraŭ; unu sindetenis.

En la baloto per la renovigo de la komitato, 30 personoj voĉdonis. La kandidatoj ricevis la sekvantajn voĉojn:

F-to Marmou	30	S-ro Colleu	28
S-ro Pons	30	S-ro Villeneuve	28

La venonta ĝenerala kunveno okazos dum nia pilgrimo en Lourdes, de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 1999. La kongresa temo: Ekumenismo kaj la reunigo de la kristanoj estos pritraktita de P° Girault, kiu partoprenis en la grupo Dombes dum pli ol 20 jaroj.

Laŭ raporto de S-ro Pons, 280 etaj biblioj "Dio parolas al siaj infanoj " estis venditaj. UEA aĉetis ekzemplerojn por vendi ilin pere de la libroservo, precipe dum la kongreso en Montpellier.

### KORESPONDADO PRI REZE :

Mia kara MINA,

Kiam mi ricevis vian leteron el Viviers (Vd bultenon de decembro 1993), mi estis tre surprizita. Ne estas ja kutimo, ke katino skribas al hundo, ĉar niaj gentoj, kiel la katolikoj kaj protestantoj, ne bone rilatas depost jarcentoj.

Sed kompreneble vi estas, kiel mi, pacema besto, kiu profesias toleremon, repaciĝon kaj liberecon.

Precize tio estis la temo de la kongreso, kiu okazis tie en Rézé inter esperantistoj katolikaj kaj protestantaj. Ili estis pli ol 80 venintaj el 15 landoj. Mi ne tre bone komprenas, kial ili elektis tiun temon, ĉar fakte mi konstatis, ke ili jam tutamike, eĉ frate, bone rilatis inter si, helpataj de unu sola lingvo nomata esperanto.

Mi povas aserti vin, ke, kiel en Viviers, ili bone laboris kaj kantis. Ĉiutage ili havis kanthoron, ĝuste en la momento, kiam mi kutimas dormi post mia matenmanĝo. Mi ne tre ŝatis tion, sed mi pardonas ilin, ĉar vere ili bone kaj bele kantis.

Ili ankaŭ prelegis kaj diskutis pri gravaj aferoj. Ili memorigis la bonan reĝon Henriko IV, kiu volis, ke ĉiudimanĉe oni manĝas kokinaĵon, kio estis bona afero por ni hundoj, kiuj kompreneble ricevis la ostojn kaj kelkfoje iom da viando. Se mi bone komprenis, tiu bona reĝo faris ankaŭ edikton por doni permeson al la



protestantoj adori Dion laŭ sia maniero.

Stranga epoko en kiu homoj kruele batalis unu kontraŭ la alia reciproke pro religiaj kialoj. Nuntempe la hieraŭaj malamikoj manĝas kune kaj amike rilatas. Ili ja komprenis, ke Dio amas ĉiujn siajn infanojn.

Ili ankaŭ tre serioze studis tekstojn pri iu renkontiĝo okazinta en Graz (Austrio) kaj pri la problemo de la pravigo. Mi konfesas al vi, kara katamikino, ke tiuj gravaj problemoj estas tro komplikaj por hundo. Do ne atendu raporton pri ili.

Tiuj kongresanoj estis simpatiaj, kvankam ili tro ofte babilis en la koridoroj, postkiam venis la dormoperiodo. Ili eĉ unufoje kantis nokte honore al la Dipatrino. Tamen neniu plendis kaj mi estis kontenta; mi ja timis disputon inter la jamdormantoj kaj la dormontoj.

Kelkaj el tiuj kongresanoj estis iom kuriozaj. Ili ellitiĝis frumatene sed ne povis eliri el domo por spiri la freŝan aeron en la parko, ĉar oni, ĉe ni, malfermas la pordojn nur je la 7.15. Ili ĉagreniĝis, ĝis kiam oni rivelis al ili sekretan manieron por malfermi specialan pordon kaj tiamaniere eliri frumatene.

Kiel en Viviers, la lastan vesperon, ili havis distraĵon. Ili amuziĝis, ridis kaj kantis. Unu el ili rakontis strangan aferon por ni bestoj. Iu eminentulo postulis, ke nokte la homoj eliri kun lumigita lanterno. Vere la homoj estas malsuperaj al ni bestoj. Ĉu kato kaj hundo bezonas lumon por promeni nokte?

Finfine ili forlasis la domon; mi retrovis mian dormotempon post la matenmanĝo kaj la eblecon skribi al vi pri la afero, simila al tiu, kiun vi konis en Viviers en 1993.

Fartu bone, kara Mina. Plej kore via

MEDORO.

## PROKOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 30-A DE JULIO 1998.

La komitatkunveno okazis en Rézé. S-ro Bessière kaj F-ino Chaney ĉeestis.

Ili konstatis, ke la taskoj dividitaj inter la komitatanoj ne sanĝos. Ili ankaŭ pripensis la pilgrimon al Lourdes sed la finan preparon zorgos la venonta kunveno en oktobro.

La komitato ekkonis la projekton de la meslibreto, preparita de S-ro Colleu; ĝi definitive aprobos ĝin en la venonta komitatkunveno, kiu okazos la merkredon 21-an de oktobro 1998 en la konvento S-ta Jakobo en Parizo.



### POST KONGRESA RAPORTO :

Post la ekumena kongreso en Nantes, kie pro sanstato Marcel Colleu ne povis ĉeesti, Eva Farkas, Iren Bagi kaj Elizabeta Kaszak vizitis lin kaj restis tri tagojn kun li, en Boves. Ili povis admiri la belan amienan katedralon; Marcel estas preparinta por ili esperantan libreton, kiu plezurigis ilin; poste ili vizitis la domon de Jules Verne kaj promenis en la urbo. Vendredon vespere, la sepan de aŭgusto, kelkaj amienaj esperantistoj kunvenis ĉe Marcel, konatiĝis kun niaj tri hungarinoj kaj kune manĝis en bona atmosfero.

(M. Colleu)

## EKUMENA DISERVO EN MONTPELLIER

En la kadro de la Universala Kongreso, la ekumena diservo okazis dimanĉe la 2-an de aŭgusto 1998 en la moderna preĝejo de la Sanktaj Franceskoj, dank'al la bona laboro surloke de S-ino Tora kaj s-ro Basso, kiu presis la tekstojn.

Preskaŭ 700 personoj partoprenis la diservon. Celebris P° Charles Dornan (Skotlando) helpita de P° Héroux (Francio) kaj de P° Szenasi (Hungario). Pastoro Bervelling (Nederlando) predikis. La monkolekto estis dividita en du partoj: la unua al la paroĥo, la dua al la asocio por blinduloj de S-ro Tuinder.

## LA 12a KONGRESO DE ITALA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA EN ARENZANO.

La Jarkongreso de nia fratina asocio en Italio, UECI, okazis de la 4a ĝis la 8a de septembro 1998 en ARENZANO, ĉarma bankoka urbeto, Pordo de la Itala Liguria Riviera, proksime de Genova (Gênes).

Aranĝita de la juna Pastro, Don Mario GERMAN, kun la ĉeesto de Pastro Duilio MAGNANI, kaj sub la Prezidanteco de Sinjoro Serio BOSCHIN, Prezidanto de UECI, post la forpaso de la kara Profesoro SOLA, plene sukcesis tiu kongreso kiu konvenigis sesdekon da partoprenintoj, inter kiuj du francoj, gesinjoroj PONS.

Frata, gaja, kaj tre preĝanta Kongreso, kies temo estis "Nova Pentekosto", ĝi permesis al la kongresanoj partopreni la lokan feston honore de la "Infana Jesuo de Prago", kies Arenzano estas pilgrimloko.

Dimanĉe vespere, lia Eminenco Kardinalo Dionigi TETTAMANZI, ĉefepiskopo de Genova, venis en Arenzano, kaj celebris en esperanto la Meson en la kongresejo.

Poste, la tempo estis okupita de oficialaj vizitoj, UECI asembleoj, kaj vizito de GENES, mirinda kaj stranga urbego; ankaŭ, ni ne forgesu Teatraĵon pri la Sankta Spirito prezentitan de la junularo de la kongreso kaj konceptitan de Paola AMBROSETTO.

Okaze de la Inaŭguro, Sinjoro PONS salutis la Asembleon en la nomo de F.K.E.A, kaj invitis la interesotaj membroj de UECI partopreni nian venontan kongreson en LOURDES.

R. PONS

## KALENDARO

1999

- |       |                                  |
|-------|----------------------------------|
| 30/04 | <b>LOURDES</b> Francio           |
| ĝis   | Esperantista Pilgrimo            |
| 04/05 |                                  |
| 17/07 | <b>SEBRANICE</b> Ĉeĥio           |
| ĝis   | 18-a IKUE-Tendaro                |
| 24/07 |                                  |
| 01/08 | <b>BERLINO</b> Germanio          |
| ĝis   | 84-a Universala Kongreso         |
| 08/08 |                                  |
| 7/08  | <b>GLIWICE</b> Pollando.         |
|       | 14-a Ekumena Kongreso            |
| ĝis   | 52-a IKUE-kongreso               |
|       | 49-a KELI-kongreso               |
| 14/08 | 3-a Junulara Ekumena Tendaro JET |

## Tra la mondo :

Kelkfoje la vendo de nia Biblio estas okazo de gratuloj por nia Asocio kaj de kortuŝantaj esprimoj, ĉefe de malproksimaj samideanoj.

Tio estas la kazo de Samideano de MEDELLIN en KOLOMBIO, S-ro VELASQUEZ, kiu, mendante Biblion, sendis al mi foton de sia grupo, kun la sekvanta mencio:

“ Ni estas grupo de katolikaj esperantistoj, kiuj per nia verdblanka uniformo propagandas nian karan lingvon, kaj per nia konduto Kristana, klopodas propagandi nian katolikan fidon. “

Ĉiujn  
niajn  
gratulojn.  
Tio estas  
por ni  
bona  
ekzemplo  
de  
Kristana  
kaj  
Esperanta  
Fido.

(R.Pons)



Nia asocio pilgrimos al **Lourdes** de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 1999.

Ni loĝos en komforta du-stela hotelo, proksime al la groto.

Do Pripensu jam pri via partopreno en tiu pilgrimo. Informo, programo kaj aliĝilo aperos sur la decembra bulteno .

**ALIĜU ! ALIĜU ! ALIĜU ! ALIĜU ! ALIĜU !**

### **LASTAJ MINUTOJ : 04-11-1998**

En la fama ĵurnalo LE MONDE aperis hodiaŭ tuta paĝo pri esperanto . (p. 15 Nro 16725)  
titolo: “ L'espéranto n'est pas moribond “

## Kotiztabelo 1998

I.K.U.E kun “Espero Katolika” 140 F

Peranto : S-ro M. COLLEU

95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES

P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

A.C.F.E kun “Franca Katolika Esperantisto” unuopulo : 60 F  
geedza paro : 80 F

infano ĝis 16-jara,pastro,religiu(in)o : 30 F

bonfaranto :200 F

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 3eme trimestre 1998

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM